

---

# Gazeto

# Andaluzia

---

—MEZ REDAKCIO —EM

— DIREKTANTO: J. GARZÓN RUIZ —

<sup>A</sup>  
Cefaj kunlaborantoj: *E. Cano, I. Casas, R. Codorniu, J. D. Coronado, C. Escobés, E. González Escandón, J. Hedley-Ince, V. Inglada, P. Linares, A. López Villanueva, E. Llamas, M. Pece, R. de la Peña, A. Roca, G. Ruiz, María del M. Terrones, M. Terrones.*

1.<sup>a</sup> Jaro.

Julio de 1910.<sup>a</sup>


Numero 7.<sup>a</sup>

**ENHAVO:** S.<sup>o</sup> R. Codorniu.—Mia preghejo.—Historio.—Regno de animoj.—La recepto de la gazpacho.—La Capitano Veneno.—Kroniko.—Crónica.

## Sro. R. Codorniu

Tre malmultaj viroj estas kiuj, kiel Sro. Codorniu, prilaboris nian karan lingvon. Antaŭ dek jaroj, li prenis sur sin la malfacilan entreprenon disvastigi Esperanton en nia patrujo, ne estante barioloj, kontraŭ lia antaŭenirado, la penadoj, la klopodoj kaj eĉ la malplezurigaj ŝancoj de iaĵ nesciuloj, kiuj, kun doktoreca mieno, diskutadis kion ili tute ne konas kaj tion, kio starigas la plej gloran kunligilon de la homoj.

Tiu ĉi fama Inspektoro de la kerpuso de Inĝenieroj arbaraj, fondis la Hispanan Societon p. p. Esperanton, kaj la Esperantistan Murcian Grupon; faris kursojn de Esperanto ĉe la Belartara Societo de Murcio, kaj verkis bonegajn kaj propagandajn artikolojn en multaj ĵurnaloj, revuoj kaj ĉiuspecaj publikiloj. Lia aktiveco ĉiam estis kaj estas preta por disvastigi la lingvon de Zamenhof; tiel ke oni povas diri, ke li faris Esperanton en Hispanujo. Tion scias, ne nur tiuj, kiuj de tre proksime havas la feliĉon intersaĝi kun li bonan kaj sin-



ceran amikecon, sed ĉiuj, kiuj nur per lia nomo, lin konas. Mi ŝuldas al li ĉiajn bonaĵojn, kiujn mi ricevis de Esperanto; miaj verkoj kaj laboradoj pri nia kara lingvo, havas kialon en liaj boncelaj instigoj.

Ĉar li amas ĉian moralan progreson, li elstudis ne nur la sciencojn kaj beletristikojn ĉiam sentigantajn al li egan entuziasmon, sed ankaŭ la idiomojn, kies etnologiaj karakteroj estis vasta kampo por liaj lingvosciencaj amuzajoj. La lingvoj internaciaj estas unu el liaj ĉefaj ŝataĵoj, kaj krom la lingvoj franca, germana, angla kaj itala, kies arĥitekturojn li tre bone konas, li ne ignoras la fundamentojn de la plimulto da lingvoj helpaj, elpensitaj ĝis nun. Tial li diras prave, ke el ĉiuj ĉi, Esperanto estas la plej taŭga kaj internacia.

Sro. Codorniu atingis tre juste kaj meritinde altan vicon inter la

tutmondaj esperantistoj; verkante kaj laborante, pri arbarscienco, li ĝuas multajn kaj honorigajn distingigaĵojn, inter kiuj estas la Komandora Ordeno de Alfonso XII.<sup>a</sup> nur ricebebla de tiuj viroj, kiuj fariĝas indaj okaze sia laboremece kaj alta kompetenteco pri scienco, arto kaj ceteraj branĉoj de la homa sciado.

Jen rimarkinda afero: tre ofte kiam tiu-ĉi L-Komitatano, kies portreto honoras la paĝojn de nia revou, verkas en Esperanto, pritraktas arbarsciencon kaj subskribas kiel arbaristo; kaj kiam verkas hispanlingve, pritraktas Esperanton kaj subskribas kiel esperantisto. Tiamaniere, li propagas du objektojn tre laŭdindajn kaj interesplenajn, kiuj estas: *Arbo* kaj *Esperanto*.

A. L. VILLANUEVA.

Murcio la 5<sup>an</sup> de Julio 1910.<sup>a</sup>

## Regno de animo

---

Fino de la unua akto de la komedio LA KREITAJ PROFITOJ de J. Benavente,

*Dedichita al mia karega amiko*

*Sro. R. Codorniu*

SILVIO

La nokt' amfavora surŝirmas  
(l'amantojn  
per sia ĉiela edziĝo—mantel'  
Plej brilajn altkroĉis la nokt' dia-  
(mantojn  
al sia velur' el somera ĉiel'.  
En ombra ĝardeno ne estas koleroj  
dum tiu mistera maluma ĉi hor',

susuras la branĉoj, odoras plej flo-  
(roj  
kaj am' estas milda deziro de plor'  
La voĉ' kiu ĝemas, la voĉo kan-  
(tanta,  
lo voĉ, kiun igas vidradi l'amtrem',  
malpie, plej estas en nokt' aperanta,  
nur kiel kun preĝoj miksitaj blas-  
(fem'.

Anim' de l'silento, la plej eminenta,  
ĉar via silento nur estas la vort'  
de kinj formortis en amo silenta,  
de kiuj silentis dam ama la mort',  
de kiuj, amante nin ege tutvive,  
ne scii esprimi l'amegon al ni,  
Ĉu tiu nokt-voĉo nur sonas fiktive  
kaj amon, eternon, ne diras al mi?

Ĉu, panjo, ne viaj okuloj ellumas  
el tiu steleto  
brilanta ja kiel larmet' senfinama  
en nokto kun tremo?  
Eksciu per vi l'amatin' ke mi amis  
nur vin sur la tero  
kaj post via morto nur kisis min  
(lumo  
de tiu steleto!

LEANDRO

Ho pajuoj plej kara! Mi estas amin-  
(ta  
nur vin sur la tero,  
kaj post via morto nur kisis min  
(lumo  
de tiu steleto!  
*(Ili restas silente, en chirkaupremo,  
rigardante unu la alian).*

KRISPIN

*(venanta el maldekstre, mezoparte.  
Flanken).*

Ho nokt' poezio, frenez'en amau-  
(toj!...  
al ni ĉio taŭgos en nuna okaz!  
Triŭmf' estas certa. ¡Kuraĝon, an-  
(taŭien!  
Neniu nin venkos, ĉe ni estas l'am'  
(Silvio kaj Leandro, en ĉir-  
kaŭpremo, direktas sin  
tre malrapide dekstren, an-  
taŭparte. Nevidate de ili  
Krispinilin sekvas. Lakur-  
teno falas tre malrapide )  
*El la hispana lingvo kun permeso  
de la aŭtoro, tradukis.*

VICENTE INGLADA.

### MIA PREGHEJO

Sur la deklivo de la montaro  
Staras tre bela mia preĝejo.  
Ĉarmaj, mirindaj, ĝiaj kolonoj  
Rekte altiĝas ĝis la ĉielo;  
Ravaj, graciaj ĉiuj skulptaĵoj  
Ŝajnas folioj, floroj kaj beroj;  
Multaj girlandoj grimpas al supro,  
Havos tapiŝon kiel herbejon.  
Mia animo ĝuas senlime.  
Per harmonioj de la orgeno,  
Ĉar jen sonoras kiel la tondro,  
Poste ekbruas kvazaŭ la vento,  
La rivereto en ĝi murmuras  
Kantas la birdoj, zumas insektoj,  
La incensiloj ankaŭ dissendas  
Mildajn odorojn de la floretoj,  
Miloj kaj miloj da stelaj lampoj  
Brile ornamas tiun sanktejon...  
Celas la koro rekte al Dio!  
Estas arbaro mia preĝejo!

### MI TEMPLO

En la ladera de la sierra se alza  
hermoso mi templo. Sus columnas  
encantadoras, admirables, se ele-  
van derechas hasta el cielo. Todas  
las esculturas, graciosas, arrebatado-  
ras, asemejan hojas, flores y ba-  
yas; muchas guirnaldas trepan á lo  
alto, y tiene una alfombra cual pra-  
dera. Mi alma goza sin límite con  
las armonías del órgano, porque ya  
resuena como el trueno, y luego  
empieza á producir el rumor del  
viento; en él murmura el arroyo,  
cantan los pájaros, zumban los in-  
sectos. Los incensarios esparcen  
también los suaves aromas de las  
florejillas; millares y millares de  
lámparas de estrellas, brillante-  
mente adornan este santuario. El  
corazón tiende derecho hácia Dios.  
¡Mi templo es un bosque!

## HISTORIO

Likeno malgranda kavigis la ro-  
(kon.

Per dentoj acidaj de siaj radikoj...

En tero tiea ekgermis kreskaĵo

kun belaj folioj, pentritaj floretoj.

Ĝi ĉiam penante, polvigis la ŝtonon

kaj poste plej ĉarme altigis abio...

La birdoj en branĉoj nestetojn sur-

(metis,

la ventoj ĝin kisis, la aero freŝigis,

la suno ĝin benis per varmaj radioj...

Sed homo alkuris, kaj l'arbon deha-

(kis!

La birdoj popante, rapide forflugis

kaj pluvo falinta forportis la teron.

Jam sunaj radioj la rokon varme-

(gas!...

La morto jam reĝas anstataŭ la

(vivo...

La homo triumfis! Terura triumfo!

R. CODORNIU.

## UNA HISTORIA

Un pequeño líquen ahuecó la roca, por los ácidos dientes de sus raíces... En aquella tierra germinó una planta con bellas hojas y pintadas florecillas, que trabajando sin cesar, pulverizó la peña; luego se elevó el más encantador abeto. Los pájaros pusieron niditos en sus ramas, los vientos lo besaban, el aire se refrescaba, el sol lo bendecía con sus cálidos rayos... Pero acudió un hombre y ¡cortó el árbol! Los pájaros huyeron rápidamente cuando y una lluvia que se precipitó arrastró la tierra. ¡Ya los rayos del sol abrasan la roca! ¡Ahora reina la muerte en vez de la vida! ¡Triunfó el hombre! ¡Terrible triunfo!

## La recepto de la gazpacho

Kvankam eble ŝajnas malgrava afero tiu por sciigi la recepton de la Andaluzia supaĵo nomita «Gazpacho», ĝi estas inda okupi lokon en nia revuo, kies ĉefa celo estas montri al la konsiderado de la granda esperantista familio la morojn de tiu belega hispana regiono, sen la trograndigoj kaj ridindaĵoj akceptitaj de fremdaj verkistoj, por kiuj ilia nesciado ne estis baro por permesi ke ilia fantazio kuru elpensante ĥimerojn, kun evidenta malutito de la vereco, nur atentaj al ilia persona kontenteco, kaŭzita per arta penikbateto aŭ kolorintensa kaj atentaltira detalo:

Ne estas, malgraŭ ĝia vulgareco, tre populara tiu recepto; kaj kvan-

## La receta del Gazpacho

Aunque parezca asunto de poco más ó menos, éste de dar á conocer la receta de la sopa andaluza denominada «Gazpacho», es digno de ocupar un puesto en nuestra revista, cuyo objeto principal consiste en presentar á la consideración de la gran familia esperantista, las costumbres de esta hermosa región española, sin las exageraciones y ridiculeces aceptadas por escritores extranjeros, á quienes su desconocimiento no fué obstáculo para dejar correr la fantasía, inventando quimeras, con evidente perjuicio de la verdad, atentos sólo á la satisfacción personal producida por una pincelada artística ó una nota de color subido y llamativo.

kam la certigo estas iel paradoksa, ĉi tie ni ĉiuj scias fari «gazpaĉon», sed malmultaj el ni scias fari ĝin tiel, kiel oni devas ĝin fari; for de tie ĉi, en cetero de Hispanujo, la Andaluzia »gazpaĉo« ŝanĝas sian karakteron; kaj estas «gazpaĉoj» Aragonaj kaj Ekstremaduraj, pro nenio similaj al tiu, kiu nin okupas.

La Hispanlingva Vortarego mem diras pri ĝi ke ĝi, estas speco de malvarma supo, kion oni faras regule per pecetoj da pano kaj kun oleo, vinagro, ajlo kaj bulbo. Theophile Gautier, en sia «Voyage en Espagne» (1840), difinas ke la «gazpaĉo» meritas specialan priskribon: tamen, li donas recepton tute eraran. Jen, ĝi estas: oni enmetas akvon en supujon aldonante al ĝi vinagron, dentojn de ajlo, pecetojn de bulboj kukumon, ruĝpipron kaj salon. Aldonu al ĝi pecetojn de pano, kiujn oni sorbigas el tiu agrabla miksaĵo, malvarma manĝebla. Inter ni, la hundoj bone edukitaj rifuzus komprometi sianj buŝegojn en simila miksaĵaĉo. Nek Nola, nek Granados, nek Motinjo, nek Altamiras, nek aliaj klasikuloj el la Hispana kuirarto, difinas la recepton de nia «gazpaĉo;» kiu, laŭ diras D<sup>o</sup> Thebussem (1), havas nenion komunan kun la «speco de supraĵoj kiun faras la kamparanoj, per la torto kuirita sur la cindrovarmo aŭ inter la fajrkarboj, kiuj sendube estis la «gazpaĉoj» per kiuj deziris satiĝi Sanĉo Panza, ne estante ligita al la mizero de la kuracisto,

No es, á pesar de lo vulgar, muy del dominio público esta receta; y aunque la afirmación sea, en cierto modo paradógica, aquí sabemos todos hacer un Gazpacho; pero somos pocos los que lo hacemos como se debe hacer: fuera de aquí, en el resto de España, el gazpacho andaluz cambia de carácter, y hay gazpachos aragoneses y extremeños, en nada semejantes al que nos ocupa.

El mismo Diccionario de la Lengua dice de él que es un género de sopa fría, que se hace regularmente con *pedacitos* de pan y con aceite, vinagre, ajo y cebolla. Theophile Gautier en su *Voyage en Espagne* (1840) consigna que el gazpacho merece descripción especial: sin embargo, dá una receta absolutamente errónea. Héla aquí: se pone agua en una sopera, añadiendo vinagre, dientes de ajo, trozos de cebolla, pepino, pimienta y sal. Agrégansele *pedazos* de pan, que se empapan en esta *agradable* mezcla, la cual se come fría. Entre nosotros, los perros bien criados rehusarían comprometer su hocico en semejante mixtura. Ni Nola, ni Granados, ni Moliño, ni Altamiras, ni otros clásicos de la cocina española, consiguan la receta de nuestro gazpacho; el cual, como dice el Dr. Thebussem, no tiene nada de común con la *especie de migas que hacen las gentes de campo de la torta cocida en el rescoldo ó entre las brasas*, que eran sin duda los gazpachos de que deseaba hartarse Sancho Panza, sin estar sujeto á la miseria del médico que lo mataba de hambre en la Insula.

La verdadera receta del gazpa-

(1) Pseudonimo de fama verkisto, el Medina-Sidonia (Cádiz); S.<sup>o</sup> Mariano Pardo de Figueroa.

kiu mortigis lin pro ma'sato, en la Insulo.

La vera recepto de la Andaluzia «gazpaĉo» estas tiu, kiun sciigas la nomita D<sup>o</sup> Thebussem, en la numero 327<sup>a</sup> de la kredithava hispana revuo «Blanco y Negro». Li diras ĉi tiel:

La «gazpaĉo» estas saŭco en kiu la pano devas sorbiĝi, spongfaŭiĝi kaj pligrandiĝi. La ideo kiun elvokas peceto kaj pecceto estas tre diferenca ol la panpeceto, kun krustito aŭ sen ĝi, dividitaj kaj retorditaj mane; ĉar, laŭ avertas la famkonata Metinjo, «por neniam speco de supujoj oni devas traĉi la panon per la tranĉilo». Ĝia formulo estas la jena. Pistu salon, kun dento de ajlo, verda pipro kaj tomato; ĉion nekviritan; aldonu al tio grandan malsekan panmolajon kaj oleon. Kunligu ĉion, tre bone, en la ligu-kaserolo; surmetu vinagron kaj litron da malvarma akvo; filtru ĝin per maldensa filtrilo; surĵetu la panmolajojn kaj depost kvin minutoj oni povas ĝin manĝi.

Tiu ĉi estas le klasika kaj legitima «gazpaĉo», taŭga, kvazaŭ nutraĵo por preskaŭ ĉiuj kamparanoj el la malalta Andaluzio, dank'al tio, ke ĝiaj legomoj malmulte spongaj ol tiuj de aliaj landoj, kie la akvo kontribuas pli ol la suno al ilia kreskado enhavas sufiĉegan nutran substanceton.

JOSÉ GARZÓN RUIZ.



cho andaluz es la que dá el citado Dr. Thebussem, en el número 327 de la acreditada revista española *Blanco y Negro*. Dice así:

El gazpacho es una salsa en la cual el pan debe empaparse, esponjarse y crecer. La idea que despiertan *pedazo* y *pedacito*, es muy diferente del trozo de pan, con corteza ó sin ella, dividido y retorcido á mano; pues, como advierte el gran Motiño, *para ningún género de migas se ha de cortar el pan con cuchillo*. Su fórmula es la siguiente: Májase sal, con un diente de ajo, pimientó verde y tomate, todo crudo: agréguesele una gran miga remojada, y aceite. Trábase todo muy bien en la horterera; póngasele vinagre y un litro de agua fresca; cuélese por un pasador claro; échense las migas, y á los cinco minutos se puede comer.

Este es el gazpacho clásico y legítimo, que sirve de alimento á casi todos los campesinos de la Andalucía baja, gracias á que sus legumbres, menos esponjosas que las de los países donde el agua contribuye más que el sol á su desarrollo, contiene abundante substancia nutritiva.



# La Kapitano Veneno

ROMANO, ORIGINALE VERKITA

DE

PEDRO A. DE ALARCON

TRADUKITA DE

Jozefo Garzón Ruiz

1.<sup>a</sup> PARTO

## VUNDOJ EN KORPO

I

IOM DA POLITIKA HISTORIO

La vesperon de la 26<sup>a</sup> de Marto 1848<sup>a</sup>, estis pafadojkaj tranĉilbatajdoj en Madrido, inter plenmano da civiluloj kiuj, mortante, jetis la ĝis tiam fremdan krion, «Vivu la Respubliko!» kaj la militistaro de la hispana monarĥio (alportita aŭ kreita de Ataŭlfo, referita de Pelajo, kaj reformita de Trastamara) de kiu estis tiam videbla estro, je la nomo de Isabelo II, la Prezidanto de la Ministraro kaj Milita Ministro, S<sup>o</sup> Ramon Maria Narvaez...

Sed tio ĉi estas sufiĉe pri historio kaj politiko; kaj ni transiru paroli pri aferoj malmulte konataj, pli agrablaj, devenintaj de tiuj bedaŭrindaj okazintaĵoj.

II

NIA HEROINO

En maldekstra teretaĝo de humila sed ĉarma kaj pura domo el strato *Prezidos*, strato tiam tre mallarĝa kaj tordolinia, teatro de la bataleto

en tiu momento, loĝis solaj, tio estas, ne akompanataj de iu homo, tri bonaj kaj piaj virinoj kiuj tre diferencis laŭ ilia fizika kaj socia stato; tial ke ili estis, maturaĝa sinjorino, vidva, Gipuzkoana, distingindaspekta; ŝia filino, juna, Madridana, kaj sufiĉe bela, kvankam ŝajne ne simila al la patrino (kio komprenigas ke ŝi estas simila al la patro), kaj servistino, nepriskribebla, ne havanta determineblan aĝon, figuron, nek preskaŭ sekson, baptita en Mondoniedo, kaj al kiu ni jam faris troan favoron (kiel ankaŭ faris al si tiu S<sup>o</sup> Pastro) certigante ke ŝi apartenas al la homa speco.

La dirita junulino ŝajnis la simbolo aŭ viva kaj jupe vestita bildo de la komuna saĝo: tia ekvilibro estis inter ŝia beleco kaj naiveco, ŝia eleganteco kaj simpleco, ŝia graciaĵo kaj modesteco. Estus eble ke ŝi trapasus nerimarkita la publikan vojon, ne altirante la atenton de la amindumistoj, sed estus neeble ke iu delasus admiri ŝin ne enamiĝante je ŝiaj tre multaj ensorĉaĵoj, fiksinte sur ŝin la atenton. Ne estis, ne (aŭ pli bone dirate, ne volis esti) unu el tiuj allogantaj belulinoj, afektantaj, fulmantaj, kiuj altiras rigardojn tuj kiam ili sin prezentas en salonon, en teatron, aŭ promenejon, kaj kiuj kompromitas la malfeliĉulon kiu ilin akompanas, ĉu fianĉo, ĉu edzo, ĉu patro, ĉu la Pas-

tra Moŝto Johano de la Hindujo mem... Ŝi estis saĝa kaj harmonia kolekto da fizikaj kaj moralaj perfektaĵoj, kies mireginda reguleco ne rapide entuziasmigas, same kiel ne entuziasmigas la paco nek la ordo, aŭ kiel okazas pri la monumentoj bone proporciigitaj, kie nenio atentigas nek mirigas nin, ĝis kiam ni formas juĝon ke se la tuto rezultas ebena, facila kaj natura, devenas de tio ke ĉio estas same bela. Oni povus diri ke tia honesta mezranga diino estis studinta manieron sin vesti kaj kombini, rigardi, sin movi, kaj kunporti, fine, la trezorojn el sia belega juneco, tiamaniere ke oni ne povus konsideri ŝin enamiĝinta je si men, nek malhumila nek fanfarona, sed multe malsimila al la edziĝotaj diaĵoj kiuj faras fojron de siaj ensorĉoj kaj iras tra tiuj stratoj de Dio, dirante al la tuta mondo: «Tiun ĉi domon oni vendas... aŭ oni luas.»

Sed ni ne haltu antaŭ bagateloj, ĉar estas multe tio, kion ni havas por rakonti, kaj tre malmulta la tempo, kiun ni disponas.

### III

#### NIA HEROO

La respublikanoj pafis kontraŭ la militistaron, de angulo el strato *Peregrinos*, kaj la militistaro pafis kontraŭ la respublikanojn de la *Puerta del Sol* tiel, ke la kugloj de unu kaj alia deveno preterpasis an-

taŭ la fenestroj de la nomita tere- taĝo, se ili ne frapis la ferojn el ĝiaj kradofenestroj, vibrigante ilin per akrasona bruado kaj vundante, repuŝe, fenestrajn sunevitilojn, lignojn kaj vitrojn.

Same profunda, kvankam diversa per ĝia naturo kaj esprimo estis la teruro sentata de la patrino... kaj de la servistino. Timis la nobla vidvino, unue pro sia filino, poste pro la cetero de la homa gento, kaj laste, pro si mem; kaj timis la Galicidino, antaŭ ĉio pro sia amata haŭto, due pro sia stomako kaj pro tiuj de siaj mastrinoj, ĉar la kruĉego de akvo estis preskaŭ malplena kaj la panvendisto ne estis aperinta kun la vespera pano, kaj trie, iomete, pro la militistoj aŭ civiluloj idoj de Galicio kiuj povus morti aŭ perdi ion pro la batalado... kaj ni ne parolas pri la teruro de la filino, ĉar ĉu neniigos ĝin la scivolemo, ĉu ĝi ne povus eniri en sian animon pli vira ol virina, okazis ke la ĝentila fraŭlino, malatentante konsilojn kaj ordonojn de sia patrino kaj plendojn aŭ kriegojn de la servistino, ambaŭ kaŝitaj en internaj apartamentoj, glitis de tempo al tempo en la fasadaĵn ĉambrojn, kaj eĉ malfermis la antaŭfenestrojn, por juĝi pri la stato de la batalado.

(*Estos daurigota.*)





## Kroniko

La malnova kaj tre estiminda gazeto *La Suno Hispana*, kiu estis eldonata en Valencia, de S.<sup>o</sup> Aŭgusto Jimenez Loira adiaŭis nin, la ĵuspasintan Junion, pro, laŭ lia direktoro, manko de tempo, de sano kaj de aliaj necesajoj por postvivigi lin post la V.<sup>a</sup> Kongreso, kiun li opinias grandiosa elmonro de la progresado de Esperanto en Hispanujo, kaj sekve kaŭzanta de tio, ke lia tasko estas finita, nur daŭrigita pro *bedaurinda eraro*. Aliaj estas sendube tiuj kaŭzoj, eble la nekonsideraĵoj kaj nekonstanteco de la abonantoj, konsekventanta manko da mono kaj troo da lacero, nekunigebla kun la ĉiutaga gazetista penado. Ni, kiu aukaŭ eksperimentas multe da tio, bedaŭras la foriron de tiel karega kolego, kaj petas al Dio fortojn por daŭrigi nian malfacilan kaj sendankan laboradon.

La 3.<sup>a</sup> de ĉi tiu monato estis tago difinita por malfermo de Kadiz'a Ekspokio pri kreskaĵoj, floroj kaj fruktoj, ĉe la Parko *Genoveso*, kiu daŭros ĝis la 31<sup>a</sup> de Aŭgusto. Je la 5.<sup>a</sup> vespere ekkunsindis la invitatoj, kaj aŭtoritatoj, presidataj de S.<sup>o</sup> la Provincestra Moŝto. Post paroladoj kaj legado de raporto pri la antaŭlaboroj por efektiviĝi la ideon oni deklaris malfermata la Ekspo-

sicio je la nomo de la Registaro Milita muzikistaro ludis belegajn muzikverkojn, kaj la personaro preterpasis la montraĵojn, laŭdante ilin kaj aprobante tiun bonegan somerfeston.

\* \* \*

Pro ni ne scias la kialon, ni ne ricevis aukaŭ la jenajn gazetojn, malgraŭ ke ni senintermanke sendis al ili la nian, de la unua numero.

«Internacia Scienca Revuo»

«Espero Katolika»

«Universo»

«Tra la filatelio»

«Voĉo de Kuracistoj»

«Lingvo internacia.»

Denove ni petas de ili ke ili bonvolu interŝanĝi reciproke kun nia modesta revueto.

\* \* \*

### BIBLIOGRAFIO

Ni ĉiam raportos pri verkoj ricevitaj.—Se ilin oni sendas duope, tiu raporto estos tre ampleksa kaj detala.

\* \* \*

Baldaŭ aperos altira jarlibreto de Hispana Societo, kies enhavo estas:

1.—Antaŭparolo de l'Prezidanto pri societaj aferoj.

2.—Regularo de Hispana Societo por Propagando de Esperanto.

3.—Provizora Regularo de la Konstanta Komitato por Propagando kaj Organizado.

4.—Provizora Regularo pri orga-

nizado de Profesoraro kaj perpoŝte Instruado.

5.—Nomaroj.—Protekta Komitato.—Direkta kaj Konstanta Komitatoj.

6.—Anaro de la Societo.

7. Esperanto tra la mondo. Statistikaj ciferoj pri societoj, gazetoj kaj libroj en la fino de la jaro 1909. Esperanto tra Hispanujo.

8.—Ĉefeĉaj vortaretoj, franca, angla, germana, itala kaj hispana.

Tiu bela dezirinda jarlibreto estos sendita dum la nuna monato al ĉiuj aktivaj anoj de H. S., kiuj pagis aŭ pagos la jaron de 1910.

\* \*

Pro demando farita al la hispana registaro de S.<sup>o</sup> la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Esperantaj Kongresoj, en Parizo, estas nomita Delegito *oficiala* por ĉeesti la 6.<sup>an</sup> Internacian Kongreson Esperantistan, ĉe Washington'o, la Kapitano S.<sup>o</sup> Jozefo Perogordo.

\* \*

Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII, akceptis la honoran prezidantajon de *Hispana Militista Societo*.

---

## Crónica

La importante revista *Amerika Esperantisto* que se publica en Chicago (American Esperantist Company-700 East Fortieth Street), dedica su número del mes actual al sexto Congreso de Esperanto, que

se celebrará en Washington en el próximo Agosto.

Contiene dicho número un hermoso artículo de Arthur Baker «Antaŭvido de la sesa», á dos columnas, inglés esperanto; otro, sólo en lengua internacional, de Allan T. Simonds, *La urbo de la sesa*, ilustrado con magníficos fotograbados, cuyos clichés cedió al efecto á dicha revista el Diario Oficial de las Repúblicas americanas (*Bureau of American Republics*) entre ellos un detallado plano de la ciudad del Congreso y descripción del segundo viaje de propaganda, hecho por los Estados orientales, con éxito asombroso.

Respecto de la cuestión sobre si asistirá el Dr Zamenhof, se decide por la afirmación absoluta, en atención á lo expresado por próximos parientes de la esposa del Doctor que viven en Nueva York.

Las sociedades esperantistas locales enseñan el Esperanto próximamente á 150 personas que, ó ya hablan y comprenden la lengua, ó han decidido hablarla antes del tiempo del Congreso.

El Sr. Reed dá un curso á los policías. Todo hace presumir que el Congreso será un éxito tan grande ó mayor que los anteriores.

Según la circular segunda reparada en el mes próximo pasado, el sábado 13 de Agosto será el día destinado para recibir á los congresis-

tas. El Dr. Zamenhof llegará de Nueva York en tren especial, con todos los esperantistas del Norte.

El domingo, cultos en las iglesias católicas, judías y protestantes, en Esperanto; y el lunes 15, solemne apertura del Congreso, con discurso del Doctor, saludos de los Delegados nacionales, etc., etc.

Uno de los números más atractivos del programa será la comida magna, en el grandísimo salón preparado al efecto y bajo la presidencia de elocuentes oradores, que distraerán á los comensales con discursos y juegos recreativos.

El sábado 20, á las 14, será la sesión de clausura. Después, como en años anteriores, se celebrarán algunas fiestas no oficiales, entre ellas una excursión al Old Point Comfort, de Virginia, que tiene gran interés histórico para los americanos y es un hermosísimo lugar digno de ser visitado por todos.

\* \* \*

Nuestro querido compañero, el Sr. D. Fernando Maréchal, autor de la celebrada obrita *Tutmonda lernolibro por paroligi Esperanton*. (Libro de estudio, universal para hacer hablar Esperanto) dirige en Leeds (Inglaterra), una Escuela para jóvenes, donde se enseña la lengua inglesa valiéndose del Esperanto y por un sistema tan simplificado que permite hacer este estudio completo en el corto plazo de

tres meses (Julio, Agosto y Septiembre). Todo el costo se reduce á cinco ó seis libras esterlinas cada mes, por pensión é instrucción. Recomendamos eficazmente á nuestros paisanos éste modesto centro de enseñanza, que sabe combinar sabiamente lo útil con lo agradable, en asunto de tan capital interés como la enseñanza de la lengua inglesa, una de las nacionales que están más extendidas por el mundo.

\* \* \*

Hemos recibido de la Casa editorial Phillips y Page, de Londres (5, Oxford Market), un ejemplar de la famosa composición musical *Kantu por ni*, traducción de la alemana *Sing mir dein Leid* é inglesa *Sing me to sleep* (Clypton Bingham), melodía de Edwin Greene, y traducción esperanta de G. L. Browne, consejero de la Asociación esperantista inglesa (*Brita Esperanta Asocio*). La edición está hecha para violín ó violonchelo cantante con acompañamiento de piano, y resulta de precioso aspecto al par que de perfecta claridad. En cuanto á la composición, es de las más bellas que se conocen de tan celebrado autor.

Cada ejemplar tiene fijado el precio de 1 Spesmilo (2,50 pesetas).

\* \* \*

El movimiento esperantista en Alemania crece más cada día.

Dresde, que está á la cabeza en

éste asunto, cuenta con 27 grupos, entre ellos uno especial de los empleados de Correos, que tiene 65 socios.

En Ausburgo se abrió, el mes de Marzo último, un curso para policias, con 58 alumnos y una sociedad para la enseñanza del Esperanto, que debutó con 100 alumnos.

\* \* \*

El sábado 11 de Junio tuvo lugar en Bégles (cerca de Bordeaux) el matrimonio de M. Ed. Marcelé, profesor diplomado de Esperanto, miembro del Comité del Grupo Esperantista de Burdeos, con madame J. Bonnal, alumna de los cursos de Esperanto de madame Deslaurier.

La ceremonia religiosa se celebró con gran asistencia de *samideanos*.

\* \* \*

El *Esperanto-Tago*, en la Exposición japonesa-inglesa, ha sido un éxito.

Se vendieron más de 1.500 billetes.

En el gran salón musical había preparado un enorme montón de hojas de propaganda, folletos, catálogos, etc., todos los cuales fueron repartidos. Conciertos, discursos, representaciones escénicas, cultos en Esperanto y excursiones marítimas se sucedieron sin interrupción, en medio del mayor entusiasmo, que seguramente ha de dar estimables frutos para nuestra causa.

\* \* \*

Pronto aparecerá el anuario de la Sociedad Española para la propa-

ganda del Esperanto, cuyo contenido es el siguiente:

1.—Prólogo del Presidente, sobre asuntos sociales.

2.—Reglamento de la Sociedad.

3.—Reglamento provisional de la Comisión constante para la propaganda y organización.

4.—Reglamento provisional sobre la organización del Profesorado y enseñanza por correspondencia.

5.—Colección de nombres.—Comité de patronato.—Comisiones Directiva y Constante.

6.—Lista de socios.

7.—El Esperanto á través del mundo. Datos estadísticos sobre sociedades, revistas y libros, al terminar el año 1909. El Esperanto en España.

8.—Vocabularios *Ĉefeĉ*, en francés, inglés, alemán, italiano y español.

Tan bello como deseado librito será remitido gratis á todos los que sean socios de número de la H. S., y paguen la cuota social para 1910 (1 peseta). El domicilio de dicha Sociedad es actualmente en Burgos, calle San Juan, 48-50.

\* \* \*

A virtud de solicitud dirigida al Gobierno español por el Sr. Presidente del Comité permanente de los Congresos de Esperanto, en París, ha sido nombrado Delegado *oficial*, para asistir al 6.º Congreso Internacional Esperantista, en Washington, el Capitán D. José Perogordo.

\* \* \*

S. M. el rey D. Alfonso XIII ha aceptado la presidencia honoraria de la *Hispana Militista Societo*.